

Nikolaus Lenau,  
Velkinta rozo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

En iu libro foliumis mi,  
kaj estis en ĝi rozo-flor',  
velkintis, dispremitis ĝi,  
tuŝata estis mia kor'.

Sed kiu iam plukis ĝin?  
Foriĝis longe la memor'.  
Se iam iu amis min,  
la amo iĝis longe for.

Aĥ, dum vespero pli kaj pli  
disiĝas tute la memor',  
kaj baldaŭ ne plu scios mi,  
ĉu min aminta estis kor'.

Kaj pli kaj pli dum la vesper'  
foriĝas ankaŭ la dolor',  
finiĝas mia voj' sur ter',  
kaj ĉesos bati mia kor'.

*Traduko de la Germana poemo "Welke Rose" de NIKOLAUS LENAŬ (\*1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1982-12-21.*

*MR-023-1 / Arg-566-1145 (2010-09-20 12:19:57)*